Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 8 Aprilo 2021



# VENTO

## Veksilologia revuo en esperanto

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

**ENHAVO** **Paĝo**

Flagoj de Internaciaj Lingvoj 3
La Flagrakonto de Milvokio 16
Lastaj Informoj pri Flagoj 20
La Fotografaĵo de niaj Legantoj 23
Kiel Pendigi la Esperanto-Flagon 24
Flagoj de la Birmaj Protestoj 26
La Angulo de la Blazonoj: *Portugalio* 30
Flagoj kaj Poŝtmarkoj:
*La hispan-respublika poŝtmarko omaĝe al usona konstitucio* 33
Nova lim-dato por la oficialia fondiĝo de VENTO 36
Veksilologia Terminaro 37
Kiel kunlabori kun VENTO 38
Veksilologia Humuro 39

*Kovrilo: Esperanto-flago dum la Brita E-Kongreso de la jaro 2007. Fotis Paul Williams.*
*Fina paĝo: Menuo okaze de E-renkontiĝo en 1913 en la urbo Gento (Belgio) desegnita de Elza Champy.*

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentantaj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# Flagoj de Internaciaj Lingvoj

✍ *José M. Rodríguez (Hispanio)*

Ni, esperantistoj, ofte pensas, ke ni estas la solaj kiuj defendas la ideon proponi al la mondo taŭgan komunikilon por detrui la *obstinajn lingvajn barojn.* Tamen, ekzistas centoj, eble miloj, da projektoj pri konstruitaj lingvoj, kvankam nur malmulte da ili aranĝis ĉirkaŭ si organizitan movadon. Kaj el tiuj movadoj nur kelkaj dezajnis, kaj poste flirtigis flagon, por diskonigi la ekziston de tiu lingva projekto.

Sendube la unua organizita movado estis tiu de la lingvo **VOLAPÜK.** La lingvo elpensita de la Pastro Johan Martin Schleyer en la jaro 1879 celis faciligi kontaktojn, ĉefe komercaj, inter homoj. Do, ne temis pri projekto por utopie unuigi la homaron kaj serĉi pacan horizonton en la internaciaj rilatoj. Pro tio, la unua simbolo adoptita de la volapukistoj estis la kaduceo, tio estas, la simbolo de Merkuro, romia dio de la komerco. Ene de tiu simbolo, jam aperanta sur la unuaj volapukaj eldonaĵoj, aperis ankaŭ ambaŭ hemisferoj kaj meze de ili la volapuka devizo: *"Menade bal püki bal"* (Por unu mondo unu lingvo).





Sciate, ke la volapuka movado iom post iom malaperis kaj nuntempe nur deko da homoj en la tuta mondo parolas tiun lingvon, kaj eĉ ne laŭ la originala versio de Schleyer, sed tiu de Ariel de Jong (1931). La redaktado de volapuka vikipedio igis necesa la adopto de simbolo, eĉ de flago, por identigi ĝin. Tiel, Michael Everson, usona volapuk-parolanto, proponis dekon da eblaj flagoj, preskaŭ similaj inter ili. Fine, tiu ĝenerale akceptita sekvas similan


dezajnon ol la esperanto-flago. Ĝi forgesis la kaducean simbolon, sur ĝi aperas ter-globon sur supera maldekstra angulo. Rilate la kolorojn, la volapuka flago uzas violan kaj flavan kolorojn en ĉiuj dezajnaĵoj proponitaj.



Aliaj flago-projektoj proponitaj:








Sur la maldekstra projekto aperas monogramo formita de la literoj M-B-P-B. Temas pri la devizo de la volapuka lingvo: *"Menade bal püki bal"* (Por unu mondo unu lingvo).

Reage al la kvin-pinta stelo de la lingvo esperanto, **IDO**, la lingvo kreita en la jaro 1907 ankaŭ kun la nomo *"Esperanto reformita"* , adoptis ses-pintan stelon kiel simbolon. Laŭdire, ĝi reprezentas la ses lingvojn el kiuj Ido naskiĝis, tio estas: angla, franca, germana, hispana, itala kaj rusa. Okaze de la unuaj idistaj kongresoj videblis tiu stelo sur hel-blua fono, kiu reprezentas la ĉielon.

Unuamomente tiu stelo ricevis malfavorajn opiniojn, ĉefe pro la fakto, ke ĝi estas tre simila al religia simbolo. Pro tio, la vic-sekretario de la Ido-akademio, la prestiĝa hungara pian-ludisto Paul von Jankó proponis alian stelon, donante al ĝi pintojn pli akutajn.

Rilate la flagon, tiu uzata okaze de idistaj renkontiĝoj daŭre ĝi estas tiu blua, hel-blua reale, kaj meze aperas la *Jankó*-stelo. Ene de la stelo oni aldonis grostipe kaj nigre la vorto "IDO". Elstarinda estas la fakto, ke la Ido-flago havas jenajn proporciojn 1:2, simila al tiu de eksa Sovet-Unuiĝo.














Okulfrape la stelo aperanta sur la idista flago estas tute malsimila, kiam oni rigardas fotografaĵon de la Ido-kongreso de la jaro 1922 en Dessau (Germanio) kaj tiu de la jaro 2016 en Valencio (Hispanio)

**INTERLINGUA** estas internacia lingvo ellaborita en la jaro 1951 de internacia komitato, la IALA (*International Auxiliary Language Association*). Kiam ĝi aperis, neniu simbolo estis oficiale adoptita, tamen, okaze de la 40-jariĝo de la lingvo (1991), kelkaj projektoj por krei flagon aperis. Sed estas necese diri, ke el la oficiala vidpunkto Interlingvao, kaj ties internacia asocio UMI *(Union Mundial pro Interlingua*), ne adoptis ankoraŭ oficialan flagon. Jen kelkaj proponoj:









Ĉi tiuj flagoj aperis sur la revuo *Panorma in Interlingua* inter la jaroj 1990 kaj 1991 kaj ties aŭtoro estas la redaktoro de la revuo, la dana Thomas Breinstrup. Ili havas saman originon kaj sendube egalan signifon: temas pri litero I, reprezentanta Interlingvaon, flav-kolora sur blua fono. Do, sama dezajno ol la Eŭropunia flago.

Verŝajne la plej sukcesa propono estis tiu de la ĉeka Karel Podrazil en la jaro 1990. Temas pri blanka stelo sur blua kaj ruĝa fono. Laŭ sciigo de la aŭtoro, la blanka stelo ampleksas la tutan flagon, por indiki, ke temas pri lingvo disvastigita tra la tuta mondo. La blua fono reprezentas la ĉielon kaj tiu ruĝa la teron.



En la jaro 1928 Otto Jespersen, prestiĝa dana lingvisto, eksa esperantisto kaj eksa idisto, proponis novan lingvon: **NOVIAL**, mallongigo en tiu idiomo de *Nova International Auxiliari Lingue.* Post la forpaso de la aŭtoro en la jaro 1943 Novial restis en la forgeso kaj iom post iom kiu ajn klopodo disvastigi ĝin malaperis. La simbolo uzita de tiu lingvo denove estis stelo. Esperanto adoptis kvin-pintan stelon, poste Ido alian ses-pintan kaj fine Novial identigis sin per sep-pinta stelo.





Novial simboloj en la komenco de la disvastigo de la lingvo

En la jaro 1998 oni lanĉis pere de interreto novan version, temis pri *Novial '98.* Oni eklaboris tiam por aperigi vikipedion en lingvo Novial (nuntempe enhavanta pli ol 1.600 artikolojn). Denove oni elektis stelon, ĉi-foje ok-pintan kvankam ne ĉiuj pintoj estas similaj. Ĝi reprezentas la sunon kiu celas lumigi kaj disvastigi siajn radiojn al la tuta mondo.



La belga diplomato Arturo Alfandari diskonigis en la jaro 1937 sian projekton **NEO**. La tuj posta mond-milito malfaciligis la diskonigon de la nova internacia lingvo, el la gramatika vidpunkto temis pri miksaĵo inter Esperanto kaj Ido. Tamen, komence de la 6-a jardeko la nova eldono de libro-metodo kaj la fondiĝo de la asocio *"Friends of Neo"* (Amikoj de Neo) helpis la disvastigon de ĉi tiu lingvo. Oni uzis neniun oficialan simbolon, tamen sur la libro-metodoj kaj la eldonaĵoj ĉiam aperis jenan simbolon:





En la jaro 1903 la itala matematikisto Giuseppe Peano diskonigis sian planlingvon **LATINO SINE FLEXIONE**. La nomo jam montras, ke temas pri simpligita versio de la latino. En la jaro 1907 Peano prezentis ĉi tiun idiomon al la Delegacio por Alpreno de Lingvo Internacia, sed li malsukcesis, malgraŭ tio li daŭrigis sian laboron. En la jaro 1910 internacia asocio kiu celis disvastigi internacian lingvon opiniis, ke Latino sine Flexione estis la plej taŭga idiomo. Tiam oni ŝanĝis la nomon per *Interlingua* (ne konfuzu kun tiu lingvo kun sama nomo aperonta en la jaro 1951). *"Academia pro Interlingua"* okupiĝis pri perfektigo kaj disvastigo de la lingvo de Peano kaj ili uzis la apudan simbolon. La *Academia* malaperis en la jaro 1939.



En la jaro 1955 James Cooke Brown ekigis projekton sur la nomo Loglan por krei lingvon tute logika. Li fondis grupon por disvolvigi tiun lingvon sed komence de la 8-a jardeko okazis malkonsentoj inter la doktoro Brown kaj kelkaj membroj de la instituto. Ili forlasis la organizaĵon kaj fondis sian propran Logiklingvan Grupon kiu nun estras la evoluigon de lingvo kiu ricevis la nomon **LOJBAN**. La nova grupo devis ŝanĝi la unuan nomon de la lingvo, pro la fakto ke D-ro Brown kopirajtigis sian elpensaĵon.

La Lojban-istoj (aŭ *loĵbanistoj)* kreis simbolon por tiu grupo, kiu nuntempe estas konsiderata kiel flago de tiu lingvo kaj movado.




Oni adoptis jenan flagon en la jaro 1990 post balotado inter loĵbanistoj. Ĉi tiu propono ricevis 35 voĉdonojn el 40 eblaj. Temas pri Venna-a diagramo kaj kartezia akso, ambaŭ simboloj estas uzataj en logikaj reprezentaĵoj

En la jaro 1922 Edgar de Wahl, eksa esperantisto, proponis novan lingvon sub la nomo **OCCIDENTAL**, kvankam post la dua mond-milito kaj kun la celo eviti la identigon de la nova projekto kun konkreta regiono de la mondo, oni renomis ĝin kiel **INTERLINGUE**. La movado favore al ĉi tiu nova lingvo-projekto organiziĝis ĉirkaŭ la revuo *Cosmoglotta.* Ĉi tiu revuo ĉiam aperigis sian simbolon sur la kovrilo, do, supozeble ĝi estis la simbolo de la nova lingvo kaj de la movado kiu disvastigis ĝin. Temis pri bildo tre simila al daoisma figuro Jino kaj Jango. Ties signifo ene de la Interlingue-movado estas la strebo de la lingvo atingi mondon interrilatan kaj unuigitan.






En la jaro 1981 aperis nova projekto pri internacia lingvo. Temis pri **VIKTO**, elpensita de la hungara Bösz Vilmos. Ĉu temis pri lingvo jam anoncita de Nostradamus? Povus esti! Vidu, en la hungara lingvo "Bösz" signifas "furioza" kaj en la verkaro de la franca astrologo oni legas jenon: "*Post la venko de furioza lingvo, la animo restos en kalmo kaj silenco".* Ĉu tiu "furioza lingvo" anoncita de Nostradamus povus esti la elpensaĵo de Bösz Vilmos?

Nu, ŝercojn for! Temas pri persona lingvo proponita de ununura homo, ankaŭ esperanto-parolanto. Ene de publikigaĵoj en la lingvo Vikto, la aŭtoro ĉiam aperigis jenan simbolon, kiu povus esti konsiderata kiel flago de la movado favore al Vikto. La eldiro sur la flago estas tre klara: "Vivu Vikto!"




La popularigo de intereto kaj ĉefe la apero de vikipedio en amaso da lingvoj igis necesa la adopton de oficialaj simboloj por elpensitaj lingvoj kiuj, ĝis tiam vere ne bezonis tiun simbolon. Unu el tiuj internaciaj lingvoj estis **GLOSA**. En la jaro 1943 Lancelot Hogben diskonigis sian projekton "Interglosa". Dum la dua mond-milito li asertis, ke estus necese trovi lingvon, kun ne tro granda vortaro -proks. 800 vortoj- bazita sur latino kaj la greka klasika lingvo, kiu povus utili kiel simpla komunikilo inter diverslandaj homoj.

En la jaro 1994 Ron Clark kaj Wendy Ashby reviziis la projekton de L. Hogben kaj ili relanĉis la lingvon Glosan kaj fondis la asocion *Glosa Education Organisation*. Pro la fakto, ke la ĉefa diskonigilo estis interreto, tie eĉ ekzistas vikipedio en glosa, ili havigis simbolon al tiu nova lingvo. Jen ĝi:



La simbolo de Glosa verdire havas tre vastan, eĉ malfacile kompreneblan, signifon. Ĝi reprezentas la teran teksaĵon kaj la modernajn komunikilojn: telefono, faksilo, radio, televido, komputiloj, intereto, satelitoj, ktp, reprezentataj de la nodoj.

La centra cirklo reprezentas la unuan vortaron kun mil vortoj eldonita en la lingvo Glosa. La dua cirklo reprezentas la mezan vortaron kun 6.000 vortoj kaj la ekstera cirklo reprezentas la plej grandan vortaron en ĉi tiu lingvo, kiu reale estas la amaso de vortoj devenantaj el latina kaj greka klasika lingvo troviĝantaj en ĉiuj lingvoj. Ĉiuj cirkloj estas malfermitaj en la supra parto, por montri ke temas pri lingvo malfermita por novaj proponoj kapteblaj de du grandaj antenoj kiuj eliras el tiuj cirkloj. Meze de la simbolo estas videbla la greka grafemo Ψ *(psi)*, reprezentanta la homan psikon.

En la jaro 1965 la universitata profesoro Cornelius George Boeree komencis la ellaboradon de nova lingva projekto. Li asertis, ke la solaj lingvoj kiuj vere funkciis ĝis nun kiel internaciaj komunikiloj, estis tiuj konataj kiel piĝinoj aŭ kreolaj.

Tio estas, miksaĵoj de malsimilaj lingvoj kiuj kunloĝas en apudaj teritorioj. El tiu proksimeco naskiĝas alia lingvo, miksaĵo de tiuj aliaj, kiu estas uzata de la popolo. Tiuj piĝinoj jam estas uzataj en multaj landoj, ekzemple en la Kariba regiono aŭ en Afriko. Tiel en la jaro 1998 li prezentis en intereto la **LINGUA FRANCA NOVA** aŭ LFN (prononcebla kiel *elefen*). Pro la fakto, ke la disvastigo okazis ĉefe en la reto, estis bezonata simbolo por identigi tiujn

 paĝojn en aŭ pri LFN, do oni adoptis oficialan flagon.

Jen ĝi:



La aŭtoro estas Stefan Fisahn, kiu ankaŭ kreis vikipedion en ĉi tiu lingvo en la jaro 2005. La flago reprezentas la kolorojn de la ĉielarko, la strioj kaj koloroj sur la flago similas al mateniĝo kaj iamaniere ĝi memorigas la flagon de la Sejŝela insularo, ŝtato kie kreola lingvo, la tiel nomata sejŝela kreola lingvo, estas oficiala kaj amase uzata. Sur la flago de LFN aperas 5 koloroj, ĉar kvin estas la kontinentoj. Kiel la idista flago, ankaŭ tiu de LFN havas proporcion 1:2.

**KOTAVA** estas internacia lingvo elpensita de Staren Fetcey en la jaro 1978, kvankam nur en 2005 la aŭtoro vaste diskonigis ĝin en interreto. Oni povas konsideri ĝin kiel modernan volapukon, pro la fakto, ke ĝi estas tute apriora lingvo, tio estas, ties eroj ne estas prenitaj el ekzistantaj naciaj lingvoj, sed elpensitaj laŭ konceptoj arbitraj aŭ logikaj. Okaze de la diskonigo de Kotava en intereto oni uzas jenan flagon:



Denove la nombro 5 videblas sur internacilingva flago, supozeble, ĉar neniu oficiala klarigo ekzistas pri la signifo de la simbolo, tiuj kvin strioj reprezentas la partojn aŭ kontinentojn de la mondo.

La zamenhofa lingvo estis inspiro de multaj aliaj lingvaj projektoj, tio okazas ankaŭ nuntempe. Inter la jaroj 2006 kaj 2010 grupo de rusaj lingvistoj

elaboris planlingvon kun la nomo **LINGWA DE PLANETA** (mallongigite *LdP* aŭ *Lidepla*) - Lingvo de Planedo-. Pere de intereto aperis grupoj de interesitoj en ĉi tiu lingvo uzantaj jenan simbolon:



Denove la diverseco de la koloroj uzataj reprezentas la tutan homaron. Kiel kuriozaĵo oni devas elstari la fakton, ke la centra parto videbla de la ter-globo estas Rusio, la patrinlando de la elpensintoj de Lidepla.

En la jaro 2005 la finna Risto Kupsala proponis la ellaboradon de nova internacia lingvo kun la nomo **PANDUNIA**. Ties celo estis uzi la plej parolatajn lingvojn en la mondo. Pro la fakto, ke preskaŭ ĉiuj kunlaborantoj estis esperantistoj, oni uzis multajn elementojn de nia lingvo. La ellaborado de la lingvo finiĝis en la jaro 2017. La flago de Pandunia estas jena:



La flago reprezentas nian planedon en koloroj verda kaj blua, eble en la sama proporcio ol la ekzistantaj akva kaj tera partoj de la mondo, kaj tio ene de la Universo. La uzo de la matematika simbolo esprimanta ekvivalenton = sendube sciigas pri la deziroj pri egaleco por la tuta mondo.

Dum la lastaj jaroj intereto vere estas akuŝejo por diskonigi personajn lingvajn projektojn. Kelkaj el ili iomete sukcesas kaj post kelke da tempo jam ekzistas komunumo preta diskuti pri la lingvo, perfektigi ĝin kaj ellabori tekstojn en tiu nova lingvo. Unu el la lastaj prezentitaj estas tiu elpensita de la lingvisto Hector Ortega, en la jaro 2019, la lingvo **GLOBASA**. Ties strukturo aludas kreolajn lingvojn, la vortoj devenas el multaj lingvoj kaj oni serĉas en la

gramatiko simplecon kaj internaciecon. La komunumo de globasa-uzantoj proponis fine de 2019 konkurson por elekti la plej taŭgan flagon por la nova lingvo. Jen la proponoj:





Kaj jen la propono adoptita kiel oficiala flago de la lingvo Globasa:



Ĉiuj proponoj aperigas la “Floron de la Vivo”, simbolo uzata en multaj kulturoj por reprezenti la kreadon. La verda koloro reprezentas la vivon, la blua estas la simbolo de la ĉielo kaj la blanka koloro memorigas la dezirojn pri paco.

En la jaro 2002 la pola Ryszard Antoniszczak diskonigis sian projekton **ATLANGO**, kun la celo utili kiel komuna lingvo inter ŝtatanoj de Eŭropo kaj Nord-Ameriko. La flago adoptita de la kreanto de tiu lingvo similas al tiu de NATO, la milit-organizo por la defendo de tiu sama monda regiono.



**MUNDEZE** estas lingvo elpensita en la jaro 2012 de Djuna de Lannoy, belgo naskiĝinta en Kongo. La lingvo havas elementojn similajn al la esperanto-gramatiko, ankaŭ kelkaj afrikaj elementoj estas videblaj en ĉi tiu lingvo. Kvankam kun malmultaj artikoloj, ekzistas vikipedio en lingvo mundeze, do oni proponis flagon por reprezenti ĝin.



Denove ter-globo kaj stelo estas uzataj kiel simboloj por flago de konstruita lingvo.

Estas karakterizaĵo de la lastatempaj internaciaj lingvoj ties simpleco rilate gramatikon. Verŝajne la ununura celo de tiuj lingvoj kiuj aperis dum la intereta epoko estas ebligi simplan komunikon inter parolantoj. Tio okazas al **ANGOS**, projekto kiu aperis en la jaro 2011. La vorto “angos” signifas en tiu lingvo “artefarita lingvo”, do la nomo mem evidentigas la fakton, ke temas pri aposteriora lingvo, tio estas, ĝi ne baziĝas sur aliaj ekzistantaj lingvoj. Rilate la flagon, kun proporcio 1:1 sur la flago aperas blanka stelo kun blua fono. Ĝi reprezentas la kvar kardinalajn punktojn, do, ĝi sciigas sian emon disvastigi sin kaj esti utila en la tuta mondo.



La listo de internaciaj lingvoj kaj ties flagoj aŭ simboloj sendube plilongiĝos kun novaj ideoj kaj novaj proponoj, sendube intereto faciligas la


aferon diskonigi tiujn projektojn. Eble pro tio naskiĝis la intereta komunumo *Conlang*, kie aniĝas pli ol mil homoj pretaj studi kaj debati pri ĉiuj novaj projektoj. Kompreneble tiu grupo havas propran flagon. Videblas sur ĝi la Babel-turo, tiu loko kiu, laŭ la Biblio komenciĝis la lingva ĥaoso. Post ĝi suno esperereble lumigos tiun lingvan konfuzon.




Flagoj de pliaj konstruitaj lingvoj:




Sambasha - 2007



Uropi - 1983



Arahau - 2006



Areidansk - 1988

# La Flagrakonto de Milvokio

*Matthew Early (Usono)*

Bona flago havas multe da potenco. Ĝi servas kiel senlingva simbolo de popolo, komunumo, aŭ nacio -kaj por la anoj, ilia identeco en bilda formo-. Konsekvence, ne estas granda surprizo, ke ĉiutage tra la mondo kreskas la kvanto da flagoj, dum pli kaj pli da grupoj de samkulturanoj konstatas, ke klara reprezent-simbolo mankas al ili. Unu el la plej bonaj ekzemploj de tiu sopiro por flago troviĝas en la rakonto de la flago de Milvokio.

Milvokio (angle *Milwaukee*) estas usona urbo kiu troviĝas apud la marbordo de la grandega Lago Miĉigano (angle *Lake Michigan*). Ĝi fondiĝis en 1846, kaj kvankam intertempe okazis almenaŭ du alvokoj por oficiala urba flago, la unua flago de la urbo oficialiĝis en 1927. Tiu flago konsistis el la sigelo de la urbo sur helblua fono:




La unua oficiala flago de Milvokio, tiu de 1927

Malgraŭ sia oficialiĝo, tiu standardo neniam estis vaste uzata kaj ĝi restis pli-malpli forgesita. En 1950, registaranoj hontiĝis miskonstatinte ke Milvokio estis unu el nur kvin usonaj urboj senflagaj kun pli ol 500 000 loĝantoj. Okazis konkurso inter la urbanoj por desegni la novan flagon. Je la fino de la konkurso, la Milvokia Artkomisiono aprobis elementojn el multaj flagproponoj

kaj oni ne volis ekskludi ion ajn. Anstataŭ oficialigi ricevitan desegnon, en 1954, komisionano mem desegnis kaj oficialigis novan flagon kunigante multajn pecojn de la diversaj sugestoj:




La oficiala flago de Milvokio depost 1954

Multaj ne plene feliĉis pri tiu rezulto, kaj la komisiono organizis du pliajn flagkonkursojn en 1975 kaj 2001. Nek unu nek la alia povis detronigi la flagon de 1954, kaj eĉ hodiaŭ tiu restas la oficiala flago de Milvokio.

En 2004, enketo inter la flagemuloj de Nordamerika Flagscienca Asocio (*North American Vexillological Association*) nomis la flagon de Milvokio la 4-an plej malbona en Usono. Desegnisto kaj podkastisto Roman Mars taksis ĝin “Unu el la plej grandaj katastrofoj en la historio de flagoj.” La flago ekfuroris en rondoj de flagemuloj kiel modelo de evitindaĵoj. Ne malfacilas vidi kial tiu ĉi flago allogas multe da malapreco, la desegno de la flago simple estas tro kompleksa por esti memorebla, sed samtempe ĝi estas tiel neidentigema ke oni bezonis surskribi la nomon de la urbo por ke la flago estu komprenita kiel ĝia simbolo.

Sed la popolo de Milvokio estas persista. Ĉio ŝanĝiĝis en 2015, kiam Steve Kodis, loka desegnisto, decidis ke li ne plu povas elteni la mokadon. Li mem starigis retan konkurson malferman al ĉiuj. Pro la nova fifameco de la flago, pli ol mil desegnoj estis proponitaj. Kvin desegnoj estis elektitaj kiel finalistoj, kaj amasa reta voĉdonado en 2016 decidis la venkanton -- “Sunleviĝo Super la Lago” (angle *Sunrise Over the Lake*) de Milvokiano Robert LENZ:



“Sunleviĝo Super la Lago,” proponita flago por Milvolkio en 2016

La ora ĉielo super la malhela blueco de la lago reprezentas la bierfaran historion de la urbo. La blankeco de la suno reprezentas pacon, unuecon, kaj la longdaŭrecon de lokaj vintroj. La tri strioj de la sunaj reflektaĵoj simbolas kaj la tri riverojn de la urbo kaj la tri vilaĝojn kiuj kuniĝis por formi la modernan urbon.


Malkiel antaŭaj provoj, tiu flago estas amase akceptita de la komunumo de la urbo. La flago ekaperis ĉe domoj, firmaoj, oficejoj, artaĵoj, varoj, kaj eĉ en najbaraj senflagaj antaŭurboj.




Diversaj fotoj de la retejo pri la sunleviĝa flago kiu montras ĝian vastan uzon tra la urbo.

Malgraŭ la entuziasmo rilate la flagon de S-ro Lenz, ĝi daŭre restas neoficiala. La artkomisiono kiu starigis la malsukcesajn konkursojn anoncis, ke la konkurso de 2016 ne validis pro la fakto, ke loĝantoj sen reta aliro ne povis voĉdoni. Kelkaj registaranoj diris, ke la kvanto de retaj voĉdonantoj simple tro malgrandas kompare al la suma loĝantaro de la urbo, kaj aliaj asertis, ke la desegno ne reprezentas ĉiajn Milvokianojn.

Do, kiu estas - aŭ, eble pli trafe, estos - la flago de Milvokio? Ne ekzistas klara respondo al tiu demando. Ĉu la serĉo por flago finfine finiĝas? Se oficiala flago estas apenaŭ uzata, ĉu ĝi vere estas taŭga simbolo? Ĉu la nuna pasio por la sunleviĝa flago montriĝos esti nur kelkjara furoro, aŭ ĉu la energio daŭros tra ebla malfrua oficialiĝo? Ĉu ankoraŭ alia flago iun tagon anstataŭigos tiun de 1954? Ĉu nenio ajn ŝanĝiĝos? Nun staras pluraj flagformaj vojoj antaŭ la popolo kaj registaro de Milvokio. Mi deziras sukceson al tiu bela urbo kaj mi interesiĝas pri la venontaj ĉapitroj en ĝia flagrakonto.



*Kunlaboru kun ni en la projekto krei fakan asocion*

## VENTO

- Se vi estas esperantisto kaj flag-amanto jen via nova asocio: **VENTO**. Niaj celoj estas pritrakti flagsciencajn temojn kaj disvastigi la internacian lingvon esperanton ĉe veksilologiaj rondoj.

- Niaj nuntempaj streboj estas oficiale fondi la asocion **VENTO** kaj peti nian aliĝon al FIAV (Federacio Internacia de Asocioj Flagosciencaj). Helpu al ni atingi tion.

- Ni petas nenian monan kontribuon, simple, legu la proponita statuto de **VENTO** kaj anoncu vian partoprenon en tutmonda kunsido de esperantistaj veksilologoj okazonta post kelkaj monatoj per interreto.

# Lastaj Informoj pri Flagoj



## La ĉina flago jam sur la Luno

Ĉinio fariĝis la dua ŝtato kiu sukcesis starigi sian nacian flagon sur la Luno. Ĉi tiu bildo de la nacia flago flirtanta sur nia satelito estas elsendita de la spaca agentejo de Ĉinio. La flagon starigis la kosmo-ŝipo Chang'e-5, la aŭtomata procedo por lokigi ĝin apenaŭ daŭris unu sekundon, kvankam la fakuloj bezonis kelkajn monatojn por konstrui la mekanismon de la flago.

Usono estis la unua lando kiu starigis sian nacian flagon, tio okazis en la jaro 1969 okaze de las surlunigo de Apollo 11. Poste pliajn kvin flagojn oni starigis en la Luno, tiu lasta en la jaro 1972.

La ĉina flago estas 2 metroj laŭ-larĝe kaj 90 centimetroj alte. Ĝi pezas unu kilogramo proksimume. Laŭ asertoj de la respondeculo de la spaca ĉina agentejo, la flago estas kapabla elteni malaltegan temperaturon.



Fotografaĵo de la ĉina flago sur la luno, havigita de la inform-agentejo AFP

## Aŭstralio hisis la aborigenan flagon

Aŭstraliaj ambasadejoj tra la tuta mondo hisis la flagon de la aŭstraliaj aborigenoj okaze de la nacia semajno por la repaciĝo. La 27-an de majo 1967 la aŭstralianoj voĉdonis amase por la adopto de leĝoj favore al aborigenoj, kiuj ĝis tiam eĉ ne aperis ene de la popolnombrado.

Do, tiu semajno estas speciale dediĉita por ke ĉiuj aŭstralianoj sciu plie pri la aborigenaj kulturo kaj tradicioj kaj tiel ĉiuj kune labori por antaŭenirigi unuigitan Aŭstralion.



Aborigena flago flirtas ĉe la aŭstralia ambasadejo en Ĉilio


## Kartvelia Flago en usona sturmo

La pasintan 6an de januaro, armitaj kaj perfortaj subtenantoj de la usona tiama prezidanto Donald Trump sturmis la Kapitolon de Usono kun la klopodo ĉesigi la reciton de voĉdonoj por la prezidonto Biden, kiu estis la gajnanto en la kalkulo de la Elekta Kolegio en 2020. La ribeluloj amase asaltis la konstruaĵon, la rezulto estis dekoj da vunditoj kaj kvin mortintoj. La sturmantoj flirtis nombrajn kaj tre diversajn flagojn, unu el ili estis okulfrape ŝokinda.

Temis pri flago de Kartvelio, kiu flirtis sub flago kun la nomo de Donald Trump kaj lia kampanja devizo. Ĉu kartveloj rajtas partopreni en la usonaj balotadoj? Kompreneble ne. La uzo de la kartvela flago sendube ŝuldiĝis al konfuzo inter la traduko de Kartvelio en la angla (*Georgia*) kaj la samnoma

usona ŝtato Georgio (en la angla *Georgia).* Sendube, tiu flag-portanto ne diferencigis sufiĉe bone ambaŭ lokojn, kompreneble ankaŭ ne ties flagojn.





Flago de Kartvelio



Flago de la usona ŝtato Georgio

# La fotografaĵo de niaj legantoj



**ARAGONA FLAGO** ĉe la fasado de la muzeo de la urbo Huesko en Aragono, norde de Hispanio. Dato de la foto: septembro 2015.

Kvar ruĝaj bendoj sur flava fono estas komuna elemento en ĉiuj flagoj de la antikva Aragona Regnolando, nuntempe temas pri la aŭtonomaj hispanaj komunumoj Aragono, Katalunio, Valencio kaj Baleara Insularo. Ankaŭ en francaj flagoj aperas tiuj ruĝaj strioj en regionoj proksimaj al antikva aragona regno, tiel en la flagoj de Provenco-Alpoj-Bordo Lazura, Orientaj Pireneoj, *Ariège* kaj en la itala urbo en Sardio Algero.


*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*

# Kiel pendigi la esperanto-flagon

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

Sur pasintaj numeroj de nia revuo ni parolis pri kiamaniere lokigi la esperanto-flagon, tamen estas necese agnoski, ke nia flago, okaze de kongresoj aŭ renkontiĝoj, plejofte ne estas hisata en stango sed rekte pendigata sur muro. Unue oni devas averti, ke se ni pendigas nian flagon ĝi devas resti kiel eble plej libere disfaldita, do, evitu ĉifi la flagon.




**Jes !**




**Ne !**

Alia rimarkinda afero estas la pozicio de la blanka kvadrato kun la stelo interne. Se ni rigardas la flagon en kutima pozicio, ni vidos, ke la blanka kvadrato situas supren dekstren. Kompreneble temas pri la dekstra pozicio, se ni konsideras, ke la flago lokiĝas antaŭ ni.





Pripensu, ke ni devas priatenti pri la dekstra/maldekstra pozicio de la flago mem, ne de la rigardanto. Do, la blanka kvadrato kaj la stelo troviĝas dekstren kaj supren en la flago. Do, se ni pendumas la flagon, la blanka kvadrato kun la verda stelo interne nepre devas esti en la plej alta pozicio kaj prefere sur la dekstra parto de la flago (maldekstren de la pozicio de la rigardanto).

Neniam la stelo devas aperi en la plej malsupra pozicio rilate la ceteran ŝtofon. Do, ni ĉiam devos eviti meti la flagon inverse, tio estas; kun stelo malsupren.




***Jes !***



***Jes !***

***kvankam preferinde la alia pozicio.***



***Tute ne !***



Fine, memoru, ke la flago, se pendigita, devas esti kiel eble plej libere disfaldita. Do, evitu ĉifi ĝin farante multajn senordajn faldojn.

# Flagoj de la birmaj protestoj

*Juan Díaz Casado (Hispanio)*

Ekde la komenco de februaro, post la armea puĉo en Birmo, parto de la birma popolo ribeliĝis kontraŭ la nova armea estraro pere de, ĝis nun, neperfortaj protestoj, malobeado, bojkotoj kaj strikoj.

Ĉi tiu malestabileco ĝenerala en la lando ekaperis en kelkaj ĵurnaloj kaj televidprogramoj, montrante plurajn bildojn en kiuj oni povas vidi buntajn flagojn, plejmulte nekonataj de la ĝenerala publiko.







Ene de la kontraŭpuĉa fakcio, la plej uzataj flagoj estas la nacia Birma flago, la flago de la partio puĉita Nacia Ligo por Demokratio (kies estro estis la prezidanto de Birmo) kaj la flago de la karena popolo.



Nacia flago de Birmo




Partia flago de la NLD



Popola flago de la karenoj

La nacia birma flago estas adoptita en la jaro 2010. Oni akceptis ĝin kiel anstataŭanton por la pasinta flago tial, ke tiu antaŭa flago enhavis socialisman originon. Pro tio, ke la estraro tiama estis liberalisma, konservema kaj simpatia al Usono, ĉiu pasinta rilato al socialismo estas forigita, forigante do ankaŭ la pasintan flagon.



Birma flago uzita inter la jaroj 1974 kaj 2010. Ĝia angula simbolo estas dentrado (reprezentanta la industriajn laboristojn) kaj riza vegetaĵo (reprezentanta la kamparanajn laboristojn), ambaŭ ĉirkaŭitaj de dek kvar steloj reprezentantaj la birmajn regionojn.

La koloroj de la nuna flago simbolas pacon, solidarecon kaj kuraĝon, kaj la stelo reprezentas la unuiĝon de la lando.

Ĉi tiu stelo ankaŭ aperas en la flago de la NLD, ĉikaze en ruĝa fundo apud la birma nacia birdo kolorigita ore. Pro tio, ke la ĉefa koloro de la NLD estas la ruĝa, ĉi tiu koloro iĝis la ĉefa simbolo de la protestoj kontraŭ la puĉo.

Ankaŭ dum ĉi tiu malestabila momento en Birmo, la karenoj (etna minoritato de sudorienta Birmo) reekprotestis pli aktive por la sendependisma movado de sia popolo.

La karena flago uzas tri kolorojn: ruĝan (braveco), blankan (pureco) kaj bluan (honesteco). Poste en la maldekstra supra angulo oni povas vidi sunleviĝon kiu reprezentas la dek du tradiciajn karenajn regionojn. Super la suno aperas ranhaŭta tamburo, tradicia karena muzikludilo.

Poste, ene de la porpuĉa fakcio, la ĉefaj uzataj flagoj estas tiuj de ĉiu branĉo de la armeo, plej ofte uzataj en paradoj.





Oficiala armea flago

Ĉi tiu flago ne estas la propra oficiala armea standardo, sed oni ĝin uzas treege ofte por armeaj paradoj kaj okazaĵoj, eĉ pli ol la ja oficiala armea flago, kiu aperas en la supera bildo (la ruĝa-blua-ruĝa kun la stelo).





Fine, ĉi tiu flago reprezentas la *Tatmadaw*, la birman defendan armearon, kaj estas ĉefe uzata de civitanoj kiuj eltenas la agojn de la armeo. Oni povas vidi ĉi tiun flagon, la nacian kaj la armean en la porpuĉaj kontraŭprotestoj.







**Memoru, ke...**

estas eble legi pasintajn numerojn de nia revuo. Vi nur devas viziti jenan TTT- paĝon:

www.esperanto.ac/vento

Aliro kaj legado de revuoj estas **tute senpaga.**



# La angulo de la blazonoj: *Portugalio*

La blazono estas la plej okulfrapa karakterizaĵo de la flago de Portugalio. Ne temas pri tipa blazono ornamita de krono, aglo aŭ mitologiaj bestoj, sed pri kompleta reprezentaĵo de la portugala historio. Ni dediĉos kelkajn liniojn por pritrakti ĉi belan simbolon.

Ĝis la jaro 1910 Portugalio estis regnolando. Ties flago estis dukolora (blanka kaj blua) kaj meze de la flago aperis la nacia blazono. Pro la fakto, ke temis pri regno, sur la blazono aperis reĝa krono. El la historia vidpunkto la flago estis ellaborita en la jaro 1830 de la provizora regent-komitato de la reĝino Maria la 2-a, kiu ekziliiĝis en la Acora Insularo, okaze de civilaj militoj inter liberaluloj kaj absolutistoj. Alie, la nuna monarkisma movado en Portugalio uzas tiun flagon.


Portugala flago 1830 / 1910


Flago por portugalaj ŝipoj

En la jaro 1910 okazis en ĉi tiu eŭropa lando respublikisma revolucio, oni abolis la monarkian politikan sistemon, do la nova registaro rifuzis tiun tradician monarkian flagon.  En la jaro 1911 la registaron proklamis la novan flagon verdan kaj ruĝan, oni uzis flagon flirtanta sur ŝipo uzita de respublikanoj dum la revolucio de la jaro 1910.



Sur la sama loko kie troviĝis la blazono sur la monarkia flago uzita por ŝipoj, tio estas je la dekstra parto de la flago, oni metis la novan blazonon de la Portugala Respubliko, tre simila, sed ne identa al tiu de la monarkio, ĉefe oni forviŝis la kronon pro la fakto, ke oni abolis la monarkion.




Jen la elementoj aperantaj sur la portugala blazono:



La blazono troviĝas sur flava armela sfero aŭ sfera astrolabo. Temas pri instrumento uzita por reprezenti la ĉielan sferon sur kies centro troviĝas la Tero, ĝiaj linioj reprezentas longitudon kaj latitudon. Ĉi tiu simbolo reprezentas la mondon eltrovitan de la portugalaj maristoj dum la jarcentoj 15-a kaj 16-a.

Sur la sfera globo ripozas la blazono mem. Unue estas videblaj sep kasteloj sur ruĝa rubando. Tradicie oni diras, ke Ili reprezentas sep batalojn de la reĝo Alfonso la 3-a kontraŭ la islamanoj en la suda regiono Algarvo. Dank'al tiuj venkoj oni forpelis definitive la islamanajn armeojn el la portugala regnolando. Tamen en kelkaj mezepokaj blazonoj, tiuj kasteloj ne estas sep, sed kelkaj pli, eĉ 16. Probable ĉi tiuj kasteloj estas aludo al la patrino de la reĝo Alfonso la 2-a, *Urraca,* kiu naskiĝis en la najbara kastilia regnolando, reprezentita de tiuj kasteloj.





Sur la centra parto de la blazono aperas kvin bluaj ŝildoj. Ili reprezentas la kvin islamajn reĝojn, kies armeojn venkis la soldatoj de la reĝo *Alfonso Herniques* en la batalo de *Ourique*. En ĉiu blua blazoneto videblas kvin arĝentaj moneroj, pro tio oni diris, ke temis pri tiuj kvin stigmatoj de Jesuo Kristo, tamen se oni vidas pasintajn portugalajn blazonojn, oni vidas, ke tiu nombro plurfoje ŝanĝiĝis, do la kristana interpreto de tiuj nuntempaj 5 punktoj ŝajnas esti pli moderna ol la blazono mem.

Kiel kuriozaĵo estas necese sciigi, ke ĉi tiu blazono mem ankaŭ ornamas alian flagon, ĉi-foje ne-portugala. Temas pri la flago de la hispana aŭtonoma urbo Ceŭto, en la nordo de Afriko. Ceŭto estis portugala urbo depost la jaro 1415. En 1580 la hispana reĝo ankaŭ fariĝis reĝo de Portugalio, do ambaŭ regnoj, Portugalio kaj Hispanio, havis saman estron. En la jaro 1640 Portugalio denove sendependiĝis, tamen la urbo Ceŭto decidis daŭri sub hispana suvereneco, tio oficialiĝis en la traktato de Lisbono subskribita en la jaro 1668.

Kiam Ceŭto aprobis sian flagon en la jaro 1995 ĝi sekvis portugalan modelon, same rilate la blazonon, kiu tradicie estis tiu de Portugalio, escepte la kronon, nuntempe forviŝita en la portugala blazono, tamen ankoraŭ ekzistanta en tiu de la urbo Ceŭto. Tamen ne temas pri reĝa krono, sed pri markiza krono, pro la fakto ke la guverniestroj de la landlimaj teritorioj estis markizoj.



Flago de Ceŭto (Hispanio)




# Flagoj kaj poŝtmarkoj:
## *La hispan-respublika poŝtmarko omaĝe al la usona konstitucio*

En la monato julio 1936 komenciĝis en Hispanio intercivitana milito. Grupo de militistoj ekigis puĉon kontraŭ la tiama registaro de la Hispana Respubliko, tamen la puĉo ne havis tujan sukceson kaj tio provokis civilan militon kiu daŭris 3 jarojn. El la internacia vidpunkto la ribelantoj ricevis apogon de la nazia Germanio kaj de la faŝisma Italio. La Respublika registaro havis apogon per armiloj kaj provizaĵoj de Sovetunio kaj Meksikio. Aliaj registaroj, ekz. Francio, Britio kaj Usono, deklaris sin neŭtralaj.

La respublika registaro komprenis, ke la emisiado de poŝtmarkoj povus havi duoblan efikon. Unue, pro la disvendado de poŝtmarkoj ne nur en Hispanio sed ankaŭ internaci-nivele la registaro povus atingi monajn rimedojn; due, tiuj poŝtmarkoj disvastigitaj en aliaj landoj povus altiri la atenton kaj la simpation de fremdaj civitanoj rilate la Respublikon, kies registaro iom-post-iome perdis teritorion en sia lukto kontraŭ la ribelantoj.

La ambasadoro de la Hispana Respubliko en Usono, S-ro Fernando de los Ríos, kontaktis kun Arthur Barger, filatelisto kaj komercisto. Artikolo publikigita de S-ro Barger sub la titolo "La poŝtmarkoj de la milito" vekis la scivolemon de la ambasadoro, kiu proponis al usona filatelisto vojaĝi en Hispanion kaj tie helpi al la respublikaj aŭtoritatuloj rilate la emisiadon de poŝtmarkoj.

S-ro Barger iris en Hispanion en la jaro 1937 kaj li kunlaboris en la fondiĝo de la Oficiala Filatela Agentejo, oficejo de la Hispana Respubliko kies celo estis emisii kaj disvendi poŝtmarkojn. La laboro de S-ro Barger estis proponi novajn emisiojn de poŝtmarkoj kaj kontakti kun filatelaj komercistoj por disvendi ilin internaci-nivele.

Unu el la unuaj proponoj de la S-ro Barger estis emisii poŝtmarkojn memore al la usona konstitucio. Ĉi tiun konstitucion oni subskribis en la jaro 1787 kaj ratifis en 1788, do en la jaro 1938 oni festis ties 150 datrevenon. Krom Usono, aliaj ŝtatoj kiel Francio, Irlando kaj Pollando ankaŭ emisiis poŝtmarkojn memore al tiu politika dokumento.




Poŝtmarko eldonita de Pollando omaĝe al usona konstitucio




Same, eldonita de Francio


La celo de ĉi tiu emisio estis, ne nur atingi iom da mono por la Respubliko, sed ankaŭ altiri la atenton de usonaj civitanoj kiuj povus simpatii al la Hispana Respubliko. Pro tio la poŝtmarko estus dediĉita por afranki aerpoŝtan servon, tio estas por eksterlandaj sendoj, anstataŭ uzi ĝin ene de Hispanio.

Tiel, la 25-an de decembro 1937 oni aprobis ordonon laŭ kiu la hispana respublika poŝto-servo emisiis serion de poŝtmarkoj omaĝe al la usona konstitucio. La dezajnisto de la poŝtmarko estis Camilo Delhom. Ene de ĝi aperis la usona kaj la hispan-respublika flagoj, kelkfoje ripetitaj. Inter ambaŭ flagoj aperis la Statuo de la Libereco de Novjorko.




Poŝtmarko eldonita de la Hispana Respubliko fine de la jaro 1937

Unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de la flagoj aperantaj sur la poŝtmarko estas la fakto, ke la usona flago estas tute korekte desegnita. Tio estas oni ne amasigis stelojn sur la flago, male oni sekvis la tiaman ordon aperanta sur la flago. Oni devas memori ke en tiu tempo, sur la usona flago aperis 48 steloj, anstataŭ la nuntempaj 50, ĉar tiam nek Alasko nek Havajo estis ankoraŭ usonaj ŝtatoj.



Steloj en la usona flago inter la jaroj 1912 kaj 1959

Ĉi tiu poŝtmarko estis tre bone akcepita de la usonaj filatelistoj, tiel oni emisiis kelkajn variantojn de la poŝtmarkoj kiuj ĉefe oni sendis en Usonon. Malgraŭ tio oni disvendis nur la duonon el la presitaj poŝtmarkoj.



Sola poŝtmarko sur folio

Rilate la eldonon de ĉi tiu poŝtmarko, oni presis 425.000 ekzemplerojn: 300.000 ene de foliegoj (50 poŝtmarkoj sur ĉiu foliego) kaj 125.000 folioj kie aperis ununura poŝtmarko. Kiam la milito finiĝis -aprilo 1939- kaj la Hispana Respubliko malaperis, restis ĉe la poŝto-servo ankoraŭ 200.000 poŝtmarkoj ne-uzitaj.

# Nova lim-dato por la oficiala fondiĝo de V.E.N.T.O.

### *Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo*

Estimataj,

kiel vi jam scias malgranda skipo de esperantistaj veksilologoj, tio estas, flagamantoj, decidis antaŭ kelke da tempo krei fakan asocion pri ĉi tiu afero. Ties nomo kompreneble estos ***VENTO***, kiu unuamomente povus signifi "*Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo"*¸tamen nun ĝi temas pri la nomo, sen mallongigoj aŭ akronimoj, de nia baldaŭ asocio.

Pro la fakto ke la revuo publikiĝas en Hispanio, kelkaj tieaj kunlaborantoj kun VENTO decidis redakti statuton kiu, post konsidero de ĉiuj interesitoj, estos registritaj ĉe la hispana administracio. Sed atentu, ne temas pri nacia organizo, ĉar ĝi estos tutmonda, tamen estas necese fondi ĝi sur iu ajn konkreta loko.

Jen la proceduro por leĝigi nian novan asocion kaj ankaŭ jen nia invito al ĉiuj por partopreni kaj ĉefroli en ĝi:

1) Ĉi tie vi povos legi la proponitan statuton. Kiel dirite, temas pri statuto redaktita por esti aprobita en Hispanio, do, eble kelkaj aferoj povas ŝajni fremdaj al iuj. Tamen, memoru, ke oni bezonas registri la asocion sur konkreta lando en la mondo. Ni elektis Hispanion, ĉar la plejmulto el la iniciantoj de ĉi tiu asocio estas hispanoj.

2) Se vi deziras modifi, enmeti aŭ forviŝi ion, bv. skribi al jena adreso: cordoba@esperanto.ac kun via propono. Same, se vi konsentas kun la proponita statuto kontaktu kun ni por sciigi, ke vi estas preta kunlabori kun ĉi tiu nova asocio.

3) **Bv. fari tion antaŭ la 30-a de aprilo 2021.** Post tiu dato ni informos al ĉiuj interesitoj pri onta interreta renkontiĝo. Tiu akto estos la oficiala unua renkontiĝo por krei VENTO-n.

4) Dum tiu renkontiĝo oni sciigos al ĉiuj pri la sanĝoj proponitaj al la statuto kaj ĉiuj partoprenantoj rajtos voĉdoni.


5) Poste, ni redaktos akton pri la renkontiĝo kaj kune kun la statuto aprobita ni petos al la hispana administracio la registrigon de ***VENTO***.

Do, ne hezitu kunlabori kun ni, legu la statuton, sendu viajn opiniojn kaj vian pretecon partopreni en la renkontiĝo al ĉi tiu ret-adreso. Ni serĉos taŭgan horon kaj daton por ĉiuj eblaj partoprenantoj en la mondo.

*Amike Via, la VENTO-skipo.*




## Veksilologia Terminaro



# Kiel kunlabori kun *VENTO*

- Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

- Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

- Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

- La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.


- Memoru, ke niaj elektronika adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:

Revuo VENTO
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*VENTO* aperas tri-foje en la jaro (aprilo – aŭgusto – decembro).



# Veksilologia Humuro





***Norvegio, ĉu la plej enhavo-riĉa flago ?***

Notu la adreson de nia revuo: cordoba@esperanto.ac

Antaŭaj numeroj libere legeblas ĉe: www.esperanto.ac/vento

La adreso kaj la TTT-paĝo estis afable havigita de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. www.esperanto.ac

Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvenaj.


PAX
VICTORIA
MENUO
TESTUDA SUPO
KRUSTAJOJ „JOINVILLE"
DETRANĈAJO DE SALMO RICA
TERPOMOJ DE LA INSULOJ
BOVLUMBAJO „CLAMART"
GRASAJ KOKINOJ EL „LE MANS"
PIROJ KASTELO
DEUSATUFAJO DE OMAROJ REPORTIGO
KUKO - FRUKTOJ
DESERTO
GENTO, 14an AŬGUSTO 1913
Elza Champy
Antverpene